

M. 15167: 1.

(översätt. 1 sida)

Brasilien

uppt. år 1952

Svar i LUF 85 rör hästkött och hästslakt m. m.
s. 1.



ESPERANTISTA SOCIETO
DE PORTO ALEGRE

CAIXA POSTAL 1415
PORTO ALEGRE
Rio Grande do Sul - Brazilo

FOLKLIVSARKIVET

Institutionen för folklivsforskning
vid Lunds universitet

M. 15167:1

Brazilien

74

Pôrto Alegre, Rio Grande do Sul, Brazilo
la 9an de Julio, 1952

Etnologia Arkivo de la
Universitato de Lund
Finngatan 8-LUND- SVEDUJO

Estimataj Sinjoroj,

Pri via esplorado ni respondas la jenon:

1 - En sud-Brazilo, Urugvajo kaj Argentino (regiono plata, kovrita per verdaj kamparoj, tre bona por brutarbredado), tio estas, la konata regiono nomata "Pampas" la ĉevalo estis antaŭe preskaŭ la sola transportilo. Pro tio ĝi estis kaj estas tre estimada de la kamparanoj ("gauŝo"- portugallingve, kaj "gauĉo" hispane). La "gauŝoj" konsideras la ĉevalon kiel "amiko" kaj neniam oni manĝis ĉevalviandon. Ĝis nun ĉevalviando ne estas uzata kiel nutraĵo.

Eĉ la plej malriĉuloj ne kuraĝas manĝi ĉevalviandon.

2 - Ne, la mortigado de ĉevalo, hundo, kaj kato neniam kaŭzis socialan malhonoron en tiu ĉi regiono.

3- Ne ekzistas ĉe ni speciala persono, kies tasko estu mortigi ĉevalojn kaj katojn. Nur la vagabundajn hundojn oni mortigas, por eviti la hidrofobion. La mortigantoj ne ricevas specialan nomon.

4 - En nia regiono, en la urboj oni kaptas sur la stratoj, la hundojn vagantajn kiuj al neniu apartenas, kaj per speciala ŝarĝaŭtomobilo kunportas ilin al urba hundejo (kanil). Tie, post 5 tagoj, se ne aperas la posedanto, kiu devas pagi imposton, oni mortigas la hundojn per veneno, (La hundo manĝas peceton da viando kun veneno) kaj post oni bruligas ilin.

Kelkaj hundoj estas sendata al Kuracista Fakultato por esti utiligata en eksperimentoj.

Dezirante plenan sukceson en via esplorado ni restas tute al via dispono kaj sendas al vi niajn

Esperantistajn Salutojn

Alberto Flores
Sekretario

1. I Syd-Brasilien, Uruguay och Argentina (slättland, täckt av grönskande fält, mycket lämpliga för boskapsskötsel) d.v.s. den kända trakt som kallas "pampas" var hästen förut det nästan enda transportmedlet. Därför har den värderats och värderas fortfarande av bönderna ("gaúcho" uttalas det på portugisiska kaj "gaúcho" på spanska). Dessa betraktar hästen som sin vän och har aldrig ätit hästkött. Hittills har hästkött icke använts som föda. Inte ens de fattiga vågar äta hästkött.
2. Nej, dödandet av häst, hund och katt har aldrig förorsaka någon social vanära i denna trakt.
3. Det finns hos oss icke någon särskild person vars uppgift skulle vara att döda hästar och katter. Man dödar endast kringströvande hundar för att undvika vattuskräck. Exekutorerna får inte något speciellt namn.
4. I vår trakt fångar man på gatorna kringströvande hundar, som inte tillhör någon särskild och med en särskild lastb kör man dem till en uppsamlingsplats i staden. Där tar man livet av hundarna med gift, om ägaren, som måste betala skatt, icke uppenbarat sig efter 5 dagar (Hunden äte ett litet stycke kött med gift) och därefter bränner man dem.

Några hundar sändas till Medicinska fakulteten för att där användas vid experiment.